

THE ELNA NEWSLETTER

News of the Language Problem and Esperanto as a Solution

1989 (6)

Making News This Issue

Testimony

The U.S. Government's ban on travel to Cuba has made it impossible for U.S. citizens to attend this year's UK in Havana. ELNA member Dr. James Lieberman provides us with a look at his response to this situation in a persuasive statement he made to officials in Washington, D.C.

See Page 5

Promoting

EGI's Derek Roff sets out the best tactics for dealing with skeptics when Esperanto comes under attack. If you ever find yourself at a loss for words or uncertain how to counter criticism of Esperanto, you won't want to miss this essay.

See Page 7

Dictionary

Few ELNA members know that there is another Esperanto-English dictionary lurking out there besides Wells'. It's called the CEED. Not yet published, the CEED could prove a boon to U.S. Esperantists weary of Anglicisms in Wells' magnum opus. Read and find out why.

See Page 10

In This Issue

Editorial	2
Letters	11
Pen Pals	14

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Modela konferenco

EGI Kunvenas en Boise

de Cathy Schulze

La Intermontara Esperanto-Konferenco okazis en Boise, Idaho, de vendredo la 29a de septembro ĝis dimanĉo la 1a de oktobro. David Barron, prezidanto de Esperanto-Grupo Intermontara, preskaŭ senhelpe organizis modelan konferencon. La University Inn estis komforta, ideala loko por la konferenco. Boise ofertis okazon viziti plurajn interesajn muzeojn. Eŭskoj ("Basques") kontribuas al la kulturo de Idaho. Sed estis la konferenc-programeroj kiuj plej kaptis nian atenton.

Konferencanoj venis el Idaho, Arizono, Kalifornio, Oregonio, Montano, Vaŝingtonio kaj Kanado.

Ĉe la unua kunveno, David Barron esploris manierojn ekspluati la gazetaron, radio-televidon ktp. Ĉiuj kontribuis ideojn. Li kunmetis kompletojn de informiloj por la ĵurnalistoj. Tagmeze raportisto el la universitata radio intervjuis diversajn konferencanojn. Same faris televidraportisto. Tre pozitiva intervjuo aperis je la 5a horo.

Posttagmeze John Mathews gvidis diskuton pri la temo: "Ĉiom Okazas Klubnivele". Ni esploris eblecojn kunlabori kun aliaj organizaĵoj.

Don Harlow diskutis la temon: "Ses Kutimaj Kontraŭargumentoj pri Esperanto kaj Respondoj". Kiel ekspertaron li elektis d-ron Sidney Culbert, Derek Roff, kaj Cathy Schulze. Apartan atenton ni donis al malafablaj demandoj kiel ekzemple "Esperanto estas nura kodo", "Angla estas la internacia lingvo".



Esperanto and the media was a major topic at the annual EGI convention

En alia programero, Joe Gamble de Portland priskribis sian inventon de Esperanta stenografio—Sonosteno.

Ĉe la bankedo, Don Harlow faris la festparoladon. Tre lerte li skizis "La lastajn 10 jarojn de la Esperanta Literaturo".

Dimanĉ-matene, Derek Roff regalis nin per elstare altnivela temo: "Muziko kaj Kanto en Esperanta Kulturo". Estas interese, kiom la moderna muziko kontribuas al kompreno de la poezio de tradiciaj poetoj kiaj Kalocsay, Baghy, kaj Auld. Tio estis unike bela programero.

Post sufiĉe luksa brunĉo en la freŝa aero, ni ĝisrevidis. Venontjare, la konferenco okazos en Salt Lake City. Mi rekomendas al ĉiuj plani por la datoj en septembro 1990 por partopreni en la ĉiam interesege EGI-konferenco.

EDITORIAL



The time of year is rolling around when various Esperanto organizations, all of them operating on a calendar year basis, are reaching out their hands for your hard-earned money. And you are wondering: shall I rejoin? Shall I pay for another year of the Esperanto League for North America?

It's a good question. Every year, most of our old members answer "Yes." A few, for reasons of their own, answer "No."

This is a particularly important time to answer "Yes."

When I was Director of the Central Office of ELNA, early in this decade, we had a membership problem; we were stuck at between 500 and 600. Oh, we could vary out of this range from time to time (in 1981 we hit 719, after a particularly good year); but in the main our pattern of growth was misnamed. It was really a pattern of stagnation.

The reason was simply that we had a 20% turnover. What this means is that every winter about 20% of our members failed to renew their memberships; and that the number of new members we acquired during the year barely made up for the number of old members lost. Why this happened, I don't know. I presume that members were not satisfied with services offered by ELNA, by the responsiveness of the Central Office, by the timeliness and quality of the Newsletter. Furthermore, we were not aggressive in going after delinquent members.

In the last couple of years, the situation has changed. Not only has the influx of new members increased, but the non-renewal rate has dropped to between ten and fifteen percent. Both of these facts have been major contributing factors to the phenomenal growth of ELNA over the 1988-1989 period.

Mark Stephens has set a goal of 1100 members for ELNA for 1990. This means by June 30, since that is the date that the Central Office has set for writing its report for the annual ELNA Congress. 1100 is not an unattainable goal; it requires an increase of only 169 members over the same date in 1989, and 1989 in

turn has already showed a 153-member increase over 1988. We hope that you will help us reach that goal.

What does the figure 1100 mean for ELNA? Much. First of all, when ELNA goes over 1000 it will, in the eyes of the world, become a completely different organization. An organization with 999 members is just a very large club, but when its membership reaches 1001, it takes on the appearance of a mass movement. At the very least, ELNA can inform more than a thousand Esperantists of the identity of those who support Esperanto. With a little bit of organization, ELNA will be able to deliver a thousand letters to the desks of those whose activities are important to us. If you are interested in proof that ELNA is already involved in attempting to influence national policies in favor of Esperanto and of more freedom for Esperantists, see Dr. E. James Lieberman's testimony before Congress elsewhere in this issue.

Furthermore, ELNA will get a new seat in the ruling Committee of the *Universala Esperanto-Asocio*. This is important, as it will give ELNA a stronger voice in the affairs of the Esperanto world as a whole.

ELNA will also profit in other ways from this membership increase. In the past ten years ELNA has answered more than twenty thousand information requests about Esperanto; and the annual number is continually increasing. Each information packet costs from fifty cents to a dollar for printing and postage. This means that today ELNA spends as much as three thousand dollars a year on the first packet of information alone. That money has to come from somewhere.

Of course, the question arises: what do you, as a member, get for your money? Most of ELNA's services are invisible; members of ELNA are in effect paying to help promote and teach Esperanto to others. This year the Central Office has answered between two thousand and three thousand information requests, compared with about 450 in 1979. To each information requestor it has provided, in addition to information about Esperanto, a copy of the first lesson of the

Ten Lesson Free Postal Course. In the last few years, more than four thousand of those first lessons have been returned, completed, to Mrs. Catherine Schulze, who has done yeoman's work in helping beginners steered to Esperanto by the Central Office learn the language.

But, in fact, this activity by the C.O. is actually, in the long run, advantageous for you as a member of ELNA. Esperanto, like the telephone, becomes more useful as more people speak it. With twice as many Esperanto-speakers in the United States, ELNA could add more staff and more services—a larger Newsletter, appearing more often; a better stocked book service, with a greater selection of titles; books of its own (the Richardson book is a step in that direction); or sponsorship of visits by foreign Esperantists.

There are more immediate advantages. For instance, ELNA offers members a five percent discount on all books available through the book service. In 1990, members will receive seven issues of the renamed Newsletter (*Esperanto USA*) totalling 96 pages—whose content, we hope, will be of relatively high quality. In addition, members will receive copies of the new *ELNA Update*, published for the Friends of Esperanto and totalling between eight and sixteen pages over the year. Add to this the new book catalog, scheduled to appear (in a more attractive format) early in 1990, the *ELNA Adresaro*, and access to the subscription service with its new, expanded line of magazines, and continued membership in ELNA actually looks pretty darned good—especially at 1981 rates!

So if you haven't already renewed your ELNA membership for 1990, please take just a moment to do so today. You'll be doing ELNA a favor—and you'll be doing yourself one, as well.

Note on the contest to complete "Freĵo kaj la Marsanoj": We have two entries, one of them submitted at the last moment. Both participants are going to get a prize: a science-fiction book in Esperanto. Both submissions will appear in the Newsletter over the next few months. Watch for them!

—Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

En sia n-ro 2 de 1989, la ĵurnalo de la Junaj Eŭropaj Federalistoj, *The New Federalist* (anglalingva), proponas artikolon "Is There Hope for Esperanto?" de Sandra Pellegrum, vicprezidanto de JEF-Nederlando. S-ino Pellegrum diskutas Esperanton, sed fine rifuzas ĝin favore al la angla, kiun oni "universale" uzas (kvankam, ŝi konfesas, malbone kaj nekonsekvence), kaj kiu estas parenca al la nederlanda lingvo kaj tial facile lernebla de nederlandanoj kiel ŝi. (sendis Ron Glossop)

John Algeo de la Universitato de Georgio dediĉas plenan kvinpaĝan artikolon al la "Centjara Datreveno de Esperanto" en la revuo *American Speech*, n-ro 64.2 (1989). La artikolo estas tre favora. S-ro Algeo, post priskribo de tute Esperantlingva kunveno de la Londona Esperanto-Klubo, klarigas pri la historio, lingva strukturo, kaj aktuala stato de Esperanto. (sendis Rochelle Grossman)

Aperis dupĝa artikolo "East, then south ... West, then north" de "Thorn" en la novpagana revuo *Red Garters* (1989/5) de la New Wiccan Church. La artikolo favore traktas la historion kaj aktualan staton de Esperanto. (provizis "Thorn")

En la revuo *World Literature Today* (Printempo, 1989), eldonita de la Universitato de Oklahoma, aperas interesa recenzo fare de Humphrey Tonkin pri *Enlumigo*, poemaro verkita en Esperanto de la skota poeto Albert Goodheir. (dankon al d-ro Goodheir, kiu sendis de Skotlando)

Anne Hilda Koff, Re prezentanto ĉe UNO de Pilot Club International, laŭdas Esperanton in "Esperanto: A Major Step Toward Peace" en *The Pilot Log* (Junio, 1989). "Pli multe da komunikado pli kaj pli kunigus la homojn en fido kaj amikeco ... kiel gasto ĉe Esperantolunĉo en UNO, mi rimarkis la varman kaj naturan komunikadon per Esperanto inter homoj de diversaj landoj," s-ino Koff skribas. (sendis Rochelle Grossman)

Jorge Luis Medina, stabano de la San Juan (PR) *Star* (26a de aŭgusto, 1989), klarigas, ke "Group seeks to interest islanders in Esperanto". La artikolo traktas la historion de Esperanto kaj ĝian aktualan staton, kaj mencias, ke en Portoriko laboras por Esperanto d-ro Mario Agrait Marty, prof. Tomas Sarramia, kaj s-ino Gladys Ortiz Pinero. (raporto sendita de Tomas Sarramia)

Nur unu tagon post la supera artikolo, aperis en la dimanĉa ĵurnalo *Puerto Rico Ilustrado* (27a de aŭgusto, 1989) artikolo "Ponce hablo en esperanto" de d-ro Tomas Sarramia mem. D-ro Sarramia aldonas al la kutimaj informoj kelkajn pri la strukturo de la lingvo, kaj ankaŭ pri ĝia historio en Portoriko. Li bone resumas la diversajn nunajn sintenojn al la lingvo: "Por multaj, ĝi estas simple mito; por aliaj, la fina ekflirto de agonianta idealo. Por kelkaj, la unusola lingvo kapabla unuigi la mondon." (sendis Tomas Sarramia)

Robert LeChevalier, ĉefa proponanto de Lojban, skisma dialekto de la artefarita lingvo Loglan, en sia tute anglalingva novaĵletero *le lojbo karni* (Aŭgusto, 1989), forte kritikas la private eldonitan verkon *Loglan 1* de d-ro James Cooke Brown, inventinto de la originala lingvo, pro diversaj kialoj, inter alie, ke li "ligas [grandegan signifon] al la fakto, ke kelkaj homoj balbuteme paroletis nun obsoleitan version de la lingvo en 1977. Tiun faron li favore komparas kun la flua parolkapablo de 30 000 ĝis 100 000 esperantistoj (tiuj ciferoj estas disputinde malaltaj, se ne temas nur pri plene dulingvaj parolantoj); esperantistoj insistas pri almenaŭ 1 miliono da parolantoj en nura Ĉinio." (sendis Reg Reid)

En la Oak Park, IL, *Wednesday Journal* (13an de septembro, 1989), Meinrad Scherer-Emunds dediĉas kvinolumnan artikolon al esperantisto Bern Wheel kaj al Esperanto. En la artikolo, s-ano Wheel emfazas la idean flankon de la Esperantomovado. Li ankaŭ proponas 15-semajnan kurson en la urbo, kaj mencias la

eventualan ekziston de aliaj lokaj esperantistoj, kiujn li ne konas, pro ok-jara Esperanto-programserio ĉe la loka radiostacio WOPA inter 1964 kaj 1972. Eble koincide, la redaktoro apudmetis favoran recenzon pri la libro *The Story of English* de Robert McNeil, Robert McCrum, kaj William Cram. (sendis Bern Wheel)

Laŭ artikolo "Scholarships 'r' us" en la Oakland, CA, *Tribune* (24an de septembro, 1989): "Vi ne povis decidi, kiun lingvon studi, do vi studis ĉiujn—eĉ Esperanton. Nun vi volas lerni pli. La Norwich Jubilee Esperanto Foundation proponas 1 000-pundan stipendion por vojaĝi al Britio por daŭrigi la konversacion." (rimarkita de la redaktoro)

Artikoleto en la portorika ĵurnalo *Dialogo* (septembro, 1989) mencias la partoprenon de d-ro Tomas Sarramia en la Esperanta somera kursaro ĉe SFSU, kaj donas lian adreson en Rio Piedras, PR, por interesitoj. (sendis Tomas Sarramia)

"Oficialulo diras, ke hungaroj pramaniere faras ĉion" estas la titolo de artikolo en la Portland, OR, *Oregonian* (15an de oktobro, 1989), en kiu Julie Tripp citas el intervjuo kun Istvan Gether, ĉefkonsilanto en la hungara Ministrejo por Medio kaj Akvodistribuo. La artikolo, meze de citaĵoj pri aktualaj politikaj perspektivoj de la hungaraj politiko kaj ekonomio, mencias, ke Gether vizitas Portlandon "por paroladi antaŭ la loka internacilingva grupo, Esperanto".

En la tria volumo de la verko *Read More About It* ("An Encyclopedia Of Information Sources On Historical Figures and Events"), eldonita en 1989 de The Pierian Press en Ann Arbor, MI, aperas sur paĝoj 762-765 sufiĉe bona kaj informplena artikolo "Ludwik L. Zamenhof" pri la kreo, kreinto, kaj nuna stato de Esperanto. Post la artikolo—kiun verkis ELNAano Reginald Jaderstrom, kaj kiun akompanas Esperanta traduko de Donald J. Harlow—troviĝas listo de uzeblaj verkoj, kaj la adreso de ELNA.



REGIONAL REPORT

Esperanto Activity in the United States

ARIZONA

Post vizitoj en Novjorko (NY), Natick (MA), Pittsfield (MA), Ĉikago (IL), Kalamazuo (MI), Portlando (OR), kaj Sanfrancisko (CA), s-ano Istvan Gether, hungara ekonomikisto kaj esperantisto, restis kelkajn tagojn ankaŭ kiel gasto de ELNA-ano Bill Shanks en Mesa (AZ). Li prelegis ĉe Arizona Ŝtata Universitato kaj ĉe la Usona Postdiploma Instruejo, kaj estis intervjuita de diversaj ĵurnalistoj. Generale, li bone impresis tiujn, kiujn li renkontis. (laŭ raporto de Jay Kamchi, aperinta en *SFERILO*, bulteno de la San Francisco Esperanto Regional Organization)

CALIFORNIA

La 15an de septembro, kelkaj lokaj esperantistoj el la Goltara Regiono kungrupiĝis en la Centro por Polaj Artoj kaj Kulturo en San Francisco por festi la ĉeeston de 21 polaj turistoj, kiuj vojaĝis tra Okcidenta Usono helpe de la entrepreno Esperantotur de BYDGOSZCZ, Pollando. Krom ordinara interpersona kunsidado kaj diskutado, okazis festeneto kun ĉokolada kuko kaj ĉampanvino provizitaj de Esperanto-VojaĝServo. Inter ĉeestantoj estis: Don Harlow, Redaktoro de la ELNA Newsletter; Lucille Harmon de Esperanto-VojaĝServo; Roberta McFarland, Prezidanto de la Berkliana Esperanto-Ligo; Ionel Onet, Asistanto al la Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA; s-ino Wanda Tomczykowska, Direktoro de la Centro; kaj s-ino Alina Wierzbanska, kiu aktivis en la Pola Esperanto-Asocio antaŭ sia enmigro al Kalifornio. Bonvenigan paroladon faris William R. Harmon, Ĉefdelegito de UEA por Usono. Por la kelkaj turistoj kiuj ne scipovis Esperanton, ĉion interpretis s-ano Andrzej Grzebowski, la Prezidanto de Esperantotur.

La 9an kaj 10an de oktobro, la Golfan Regionon vizitis s-ano Eugeniu Mustea, rumana meteologo nun loĝanta en Meksiko. S-ano Mustea estas bona kontakto inter esperantistoj kiel la persono, kiu

semis Esperanton en Angolo kaj Haitio. Li paroladis pri siaj Esperanto-spertoj antaŭ la kursanoj de la miznivela Esperanto-kurso ĉe la Universitato de Kalifornio (Berklio).

J. Tilman Williams, fondinto kaj unua Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Orange County, proponas al la Esperantistoj plurhektaran parcelon apud la urbo Barstow, kondiĉe, ke oni uzu ĝin por Esperantaj celoj. La parcelo nomiĝos "Oazo de Esperanto", kaj EAO n nun studas eblecojn, kiel utiligi ĝin. (informis Paul Studier)

La 26an de oktobro, Prof. Ronald J. Glossop de Southern Illinois University (Edwardsville), ano de ELNA, faris la ĉefparoladon antaŭ bankedo de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj en Sacramento. La temo de la parolado estis: "Redefining National Security". Inter aliaj internacnivelaĵoj rekomendataj de Prof. Glossop favore al pli paca kaj stabila mondo estas la pli vasta lernado kaj uzado de Esperanto. Laŭ Prof. Glossop, uzo de Esperanto estas tre grava por ke ĉiuj sentu sin ano de la monda komunumo. Ĉeestis entute pli ol 250 personoj, inter kiuj kelkaj lokaj esperantistoj. (informis John Mathews kaj Ron Glossop)

IDAHO

De la 29a de septembro ĝis la 1a de oktobro okazis en Boise, Idaho, la jara konferenco de la Esperanto-Grupo Intermontara. Ĉeestis 24 personoj, kiuj venis el diversaj partoj de la regiono kaj ankaŭ el Kalifornio, Vaŝingtonio, Oregonio kaj Kanado. Pli granda raporto aperas aliloke en ĉi tiu numero.

MICHIGAN

La Montcalm Esperanto-Klubo estiĝis je dimanĉo, la 9-a de julio, ĉe Greenville post kiam Sherry Wells instruis pri la fundamentoj de Esperanto dum kvar horoj al ses virinoj. La hejmo kaj gastamo de Mary Wheeler multe plibonigis la lernadon kaj komunikadon. La grupo

elektis lundon, la 17an, por sekva kunveno kaj decidis kunveni la trian lundon de ĉiu monato je la 7a ĝis la 9a ptm ĉe la konstruaĵo de la *Greenville News*. (el *La Semanto*)

Dekses homoj el pluraj ŝtatoj kaj ankaŭ el Kanado kunvenis sabaton posttagmeze, la 22an de julio, en la 2a Ĉiujara Mezokcidenta Konferenco. La fundamento de komunikado kaj kunlaborado kreita je la konferenco lastjara pliprofondiĝis. Estis multaj sugestoj pri tio, ke *La Semanto* kresku en mezokcidentan novajleteron. Tiujn sugestojn unue konsideros la Esperanto-Societo de Michigan, kiu devas oficiale akcepti la ideon, kaj poste reprezentantoj de la interesataj Mezokcidentaj grupoj por precizigi la aferon. (el *La Semanto*)

[*La Semanto listigas grupojn en la urboj Battle Creek, Flint, Kalamazoo, Lansing, Royal Oak, Ferndale, Traverse City, Montcalm kaj Grand Haven. Pro manko de kontaktadreso, ni listigas nur la du unuajn. Pli precizajn informojn eventualaj vizitontoj povos ekhavi de la Esperanto-Societo de Michigan, kies adreso troviĝas en nia listo de lokaj kontaktoj.*]

TEXAS

Nova Esperanto-Studgrupo nun kunsidas en la Houston Bahaa Centro (2121 Oakdale, Houston, TX 77004). La kunvenoj okazas dimanĉe, je la 5.00 ptm. Oni celas fine fondi Esperanto-societon por Houston. (informis Edward F. Lacy III)



**PREPARED STATEMENT OF DR. E. JAMES LIEBERMAN
REPRESENTING
THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
FOR THE
SUBCOMMITTEE ON WESTERN HEMISPHERE AFFAIRS
COMMITTEE ON FOREIGN AFFAIRS
U.S. HOUSE OF REPRESENTATIVES
SEPTEMBER 27, 1989**

The officers and members of the Esperanto League for North America are concerned with the current restrictions on travel to Cuba for U.S. citizens because the 74th Congress of UEA (World Esperanto Association [Rotterdam]) will take place in Havana in July, 1990. We are contributing to these hearings, therefore, not as experts on Cuba or on foreign policy, but as U.S. citizens who communicate and travel with a particular perspective on international understanding.

The international language Esperanto has been in existence since 1887, just over 100 years. It is used by people around the world for every kind of communication—from pen-pal and face-to-face relationships to tourism, from hobbies and technical topics to original and translated literature of diverse cultures. The principal purpose of Esperanto is to foster cross-cultural understanding without prejudice of any kind. The language does not supplant but supplements, and thereby helps preserve ethnic tongues. The ecology of language concerns most speakers of Esperanto, who view the use of a neutral, common second language as a means to prevent the diminution of languages (and cultures) which have little international currency. As a matter of policy UEA and ELNA, its U.S. affiliate, maintain strict neutrality with respect to politics, religion, and ethnicity.

I am a physician practicing in Washington, DC, and Adjunct Professor, Department of Family and Community Development, University of Maryland, College Park. Esperanto has been an avocation for me since 1954, when I was a college student traveling in Europe. I have been a member of ELNA since that time, and served as its President from 1972-75. I have attended UEA (world) Congresses in France (1957), the U.S. (Portland, OR, 1972), Iceland (1977), and China (1986).

In recent years at these congresses (where Esperanto is the official language and is used exclusively for all events) attendance averages over 2,000 people from some 50 different countries. The U.S. is represented by about 100-200 participants; among these are official delegates to governing council and committees. For the past six years a U.S. citizen, Humphrey Tonkin, now President of the University of Hartford, has served with great distinction as UEA President.

We make two arguments in favor of lifting restrictions on travel to Cuba. First, we wish to be accorded the respect of our own government—whose watchword is freedom—as citizens capable of making informed decisions about travel. We do, of course, consider both personal and national aspects of our grass-roots diplomacy: we are deeply concerned by the very nature of

our interest in Esperanto. For us to have no choice to attend the 1990 Esperanto Congress in Havana embarrasses us as individuals and as an organization.

Secondly, native speakers of American English are as a group relatively limited in the use of other languages. Those of us who speak Esperanto are a small but not insignificant exception. When Esperanto is used in international settings we meet as equals with representatives of dozens of countries and scores of cultures.

Since Cuba is so close to us geographically, delegates from around the world will be acutely aware of our participation or lack thereof. If our numbers and therefore our voices are suppressed, the situation will undoubtedly make news far beyond the already far-flung community of Esperanto speakers. Even the prospect of this constitutes a needless diplomatic embarrassment for the United States.

We hope that the policy can be changed. For us it is an urgent matter, since planning for participation must take place months in advance. As Americans we are mindful of how our country appears to international observers and we wish to be proud of it. We believe that freedom for us to travel and participate in this meeting serves the best interests of the United States and the most important principles for which it stands.

Alvoko al Verkemuloj

Kiel en la tuta mondo (krom kelkaj esceptoj), ankaŭ la usona Esperanto-movado disvolviĝis, precipe kvante, sed ne nur. La rezultoj de tiu disvolviĝo videblas, senteblas, eĉ se ili ne estas spektaklozaj. Sendube, latentaj talentoj troveblas ankaŭ ene de la usona esperantistaro, kvankam ja pruvoĵ ne tre abundas. Eble mankis stimulo. Eble ia neglektemo enŝoviĝis inter nin. Fakte, la kaŭzo(j) eĉ ne gravas tro. Gravas la rezultoj. Rezultoj, kiuj venos sendube. Ilin ni bezonas. Post la kvanta disvolviĝo de nia movado, ni ja bezonas ankaŭ kvalitan disvolviĝon, kaj ĝin okazigos la usonaj esperantistoj mem.

Nia oficiala organo ELNA Newsletter/Esperanto USA okupiĝas pli multe pri movadaj aferoj,

konforme kun sia celo. Sed la esperantista agado ne konsistas nur el movadaj aferoj (kiuj, cetere, ripetiĝas, eĉ se ne idente). Ni devas uzi Esperanton pli multe en aliaj kampoj de la vivo. Estus jam la tempo!

Unu inter tiuj kampoj, kiuj bezonas plian atenton en tiu ĉi parto de la monda Esperantujo, estas la beletro. Mi certas, ke ankaŭ inter la nord-amerikaj esperantistoj troveblas valoraj aŭtoroj Esperantlingvaj, kiuj atendas oportunan momenton por aperigi siajn verkojn en Esperantlingva literatura eldonaĵo. Jam de (tro) multaj jaroj, en nia lando ne aperis ia literatura (vere valora) eldonaĵo Esperantlingva. Ĉu ni pretas aperigi tian eldonaĵon, sub la formo de literatura suplemento de ELNA Newslet-

ter/Esperanto USA? Ni vidu!

Ni pretas eldoni en la dua duono de 1990 tian suplementon, enhavontan viajn originalajn literaturaĵojn, viajn tradukaĵojn en Esperanto, kaj eĉ tradukaĵojn en la angla el la origina Esperanta literaturo. Kuraĝu! Sendu viajn kontribuojn, kaj ni zorgos havigi al la legantaro altkvalitan eldonaĵon, kiu reprezentu niajn literaturremulojn kaj nin mem. Viaj kontribuoj bonvenas al la suba adreso. Kaj ne forgesu: ju pli frue, des pli bone!

**Esperanto League for North America
Literatura Suplemento
P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530**



From the Central Office

The 1990 ELNA membership drive is in full swing and this year's drive is the most ambitious to date. Over 6,000 packages of membership information were mailed out during the last few weeks of October and the first week of November.

Although this might appear to be a large mailing, ELNA will need to receive a 16% return rate in order to achieve our primary goal of 1000 members in 1990 and an 18% return rate to achieve our secondary goal of 1100 members. We cannot do this without your help.

With the last issue of the ELNA Newsletter, we enclosed your ELNA/UEA membership form, as well as information about this year's subscription season. By taking the time now to complete your forms and sending in your payment you will save ELNA the cost of sending you a reminder notice. If you have misplaced your membership form, drop us a card at the Central Office and we will be happy

to send a replacement.

If you belong to a local Esperanto club, speak to your club president about how you can help establish a club based membership campaign for ELNA. We will be happy to supply your club with brochures and sign-up forms, or if you prefer, we can save you the time and trouble by mailing membership packages to the list you provide the ELNA C.O.

Why should someone join or rejoin ELNA? Besides the membership benefits you are eligible for as listed in the ELNA brochure, your membership dollars provide informational services to the thousands of people who write to the Central Office each year asking for information about Esperanto. Without your support, ELNA cannot provide this important first encounter with Esperanto.

Charlie Galvin, coordinator for volunteer affairs at the Central Office, organized a work party of local Esperantists to

help with the membership drive mailing. Special thanks for participation go to:

- Sylvia Bogdan
- Ellen Eddy
- Charlie Galvin
- Earl Galvin
- Angela Harlow
- Don Harlow
- Esther Harlow
- Reginald Jaderstrom
- Ionel Onet
- George Rodenborn
- Robert Smales

As of the writing of this article, the following groups also deserve our thanks for their efforts in the 1990 membership campaign in their areas: the Nebraska, Kalamazoo (MI), Chicago, St. Louis, NYC, and Rio Grande Valley Esperanto Associations, the Esperanto-Rondeto de Santa Barbara, SFERO, and ESNE.

—Mark Stephens

Kelkaj Konsiloj por Novaj Korespondemuloj

de Ionel Onet, ELNA Centra Oficejo

Pli ol iam antaŭe, la usona esperantista movado involviĝas en la tutmonda esperantista movado. Kaj tion pruvas ne nur la kreskanta nombro de usonaj esperantistoj aliĝantaj al ELNA aŭ/kaj UEA, kaj ilia valora agado diverskampa, sed ankaŭ la daŭre kreskanta nombro de dezirantoj korespondi kun usonaj samideanoj. Kaj, sendube, el tiuj tutmondaj korespond-deziroj publikigitaj de *ELNA Newsletter*, pluraj plenumiĝas, kaj sekve de tio naskiĝas interhomaj rilatoj, unue per la skriba vojo. Kia plezuro ricevi leterojn el la kvar ventoj, leterojn, kiuj kunportas novaĵojn kaj bondezirojn de, foje, tute nekonataj homoj! Ne multaj neesperantistoj ĝuas tiajn sentojn.

Kaj, eble eĉ pli grave, la samaj (t.e. la neesperantistoj) scias malplimulte ol la esperantistoj, pri aliaj popoloj kaj kulturoj. Oni pardonu min pro mia aserto, sed mi foje havas la impreson, ke ili estas handikapitoj.

Malfacilaĵojn kaj konfuzojn spertas

ankaŭ la esperantistoj, kompreneble. Sed, ŝajne, ili estas pli dezirantaj ol aliaj forigi tiujn barilojn, handikapojn. Kaj jen, ĉi-sube, kelkaj proponoj pri tio, kiel eviti malfacilaĵojn kaj malagrabraĵojn en nia korespondado.

Supozu, ke vi elektas adreson de korespondemulo loĝanta en iu fora lando, kies kulturon vi ne bone konas. Nu, por vi estas sufiĉe facile scii lian/ŝian personan kaj familian nomojn, senerare. Kaj vi tuj ekscios lian/ŝian loĝlokon, se vi atente legis la noton de la redaktoro de la rubriko "Volas korespondi". Tio certe plaĉas al vi. Saman senton vi kreos al via korespondonto, se ekde la unua letero, vi klarigos al li/ŝi viajn nomojn. ATENTU: ne en ĉiuj kulturoj la familia nomo staras laste. Enkalkulante, ke la hungaroj kutimas skribi unue la familiajn nomojn, kaj ke la subaj du nomoj povas esti kaj familiaj kaj personoj, mi demandas, kiu estas la familia kaj kiu la persona nomo: Ger-

gely Balazs? Dum por hungaro, Gergely estas la familia nomo, por usonano, Balazs ludas tiun rolon. Sed se ni agnoskas kaj akceptas, ke la familia nomo estas ĉiam majuskla, la nomoj GERGELY Balazs aŭ Gergely BALAZS ne plu estas kaprompigantoj. Kaj ne forgesu, ke tiu kutimo ne estas nur hungara! Kaj ne esperantigu vian aŭ alies nomon. Ne tio montros vian lertecon esperantlingvan.

Jen adreso el Rumanio, el kiu ne multo kompreneblas:

**sat Frumoasa 148
com. Montani
Jud. Ardeal.**

Nu, kiu el la tri linioj indikas al vi la loĝlokon? Neglektu la respondon (nefacilan, se vi ne konas la rumanajn manierojn), kaj ni ĉiuj akceptu, ke ĉiam la

Continued on next page

majuskla(j) vorto(j) en la adreso indikas la loĝlokon. Kaj tiam estos pli facile komprenebla la adreso:

**sat (vilaĝo) FRUMOASA
com. (komunumo) Montani
Jud. (distrikto) Ardeal.**

Memoru, tamen, ke la rumaniaj adresoj ne estas la plej komplikaj.

Kaj ne forgesu, ke oni pli kaj pli ofte (kaj kun bonaj rezultoj) uzas la indikativojn de la landoj ankaŭ en leter-adresoj, ne nur sur aŭtoj. La nomon de la lando oni kutime skribas sur la plej malsupra linio de la adreso. Kaj oni ĝenerale uzas por tio majusklaajn literojn. Kaj ne forgesu, sendante leteron el Usono al alia lando, uzi la anglalingvan nomon de la cel-lando. La usonaj poŝtistoj nek scias, nek penas scii, ke *Shquiperia* signifas *Albanio*. Kaj eĉ ne bezonate skribi surletere la nomon de la cel-lando en ties oficiala lingvo: kiam la letero atingos ĝin (se tio okazas), la nomo de la lando estas ne plu bezonata. Neniam esperantigu adresojn, nek la vian nek tiun al kiu vi sendas poŝtajon; tro malmulte da poŝtistoj parolas Esperanton. Jen du ekzemploj de adresoj:

**John SMITH
999 Lincoln Str. Ap. 999
YOURTOWN, ST 99999
U.S.A.**

**Ivan RUSKIJ
ul. Lenina 99-99
SU-999999 GORKIJ
U.S.S.R.**

Ne nur la adresoj kreas konfuzon, sed ankaŭ (kaj ne malpli) la datoj (kalendarioj). Neniam sciigu al germano, ke vi vizitos lin je la 08/10/99, se per tio vi komprenas la 10-an de aŭgusto. Neniu pretos atendi vin tiutage, ĉar la ricevinto de via letero komprenos, ke vi vizitos lin la 8-an de oktobro. Preferinde estas skribi la monaton litere; aŭ, se vi preferas uzi nur ciferojn, uzu la ordon: jaro/monato/tago—1999/08/10, aŭ uzu la romajn ciferojn (literojn) por indiki la monaton 10 VIII 1999. Ĉiukaze, la usona sistemo por skribi la daton estas nek la plej uzata nek la plej logika. La samo ankaŭ rilate horojn: ĝenerale, oni komencas mezuri la tagan tempon de la nula horo, kiu estas fakte la meznokto (12:00 AM) kaj post la tagmezo (12:00 PM) oni uzas pli grandajn numerojn: 13, 14 ... 23. Por pluraj kulturoj, paroli pri dek du posttagmeze havas nenian sencon, ĉar laŭ ili dek du signifas la tagmezon mem. Kaj same, pluraj neniam komprenos, kiel eblas paroli pri la dekdua horo matene, dum la tago apenaŭ komenciĝis.

Parto el nia ĉiutaga vivo estas la telefono. Se vi konigas al alilandano vian telefonnumeron, ne forgesu sciigi al li/ŝi ankaŭ la antaŭnumeron kaj la internacian prefikson de Usono (1). Oni ne ĉiam havas kun si Jarlibron, kaj jam estas sciate, ke la telefonistoj maltrafis multon dum la lernoperiodo (precipe geografion).

Kaj mi konsilas, ke se vi volas helpi vian alilandan korespondanton pli facile elparoli viajn nomon kaj adreson, indiku

inter parentezoj la proksimuman prononcon uzante la Esperantan alfabeton, aŭ la internacian fonetikan alfabeton. Neniam la usonan, kiu povas konfuzi la leganton. La celo estas komuniki kaj ne konfuzi.

Okazas fojfoje, ke ni devas skribi petleteron al samideano aŭ organizo en alia lando. Bela gesto estas nemeti en vian leteron ankaŭ 1-2 Internaciajn Respond-Kuponojn (IRK) haveblaj ĉe via poŝtoŝefo. Tio ne estas rekompenco por la mendita informo/servo, sed repago de la poŝt-elspezoj bezonataj sendi al vi la necesan informon.

Sufiĉe ofte, bedaŭrinde, kune kun la unua letero venas, precipe el iu mondoparto, ankaŭ (almoz)petoj pri libroj, kasedoj, sondiskoj, moneroj, monbiletoj, k.a. Tiaj petoj ne malkuraĝigu vin. Respondu klarigante la celojn de via korespond-rilato, kaj emfazante, ke la peto povus plenumiĝi iam pli poste (se vere). Kaj se vi ne ŝatas tiajn petleterojn de aliuloj, viavice ne sendu ilin al aliaj.

Eblas, ke vi ricevos amason da korespondpetoj, elinter kiuj vi elektos la plej taŭgajn por vi. Tamen ne forgesu respondi al ĉiuj, kiuj skribis al vi, eĉ se pere de via letereto vi malkonsentis korespondi kun la koncernaj personoj. Atendi vane ne estas la plej plaĉa afero.

Kaj se vi, kiel komencanto, bezonas helpon, ne hezitu peti ĝin de pli sperta samideano. Eĉ skribante al la redakcio de tiu ĉi novaĵletero, de kie direktiĝas al vi sinceraĵ deziroj de sukceso.

PROMOTING ESPERANTO

by Derek Roff

Todd Moody's recent article gave some excellent suggestions on how to answer skeptics. He also pointed out that, perhaps to justify their lack of knowledge, many people express a certain hostility to Esperanto, and attempt to "prove" its insufficiencies. Todd gave us some good factual answers to their "hard questions." I would like to make a few suggestions about dealing with their emotional resistance.

The most convincing presentation is useless, if it goes unheard. A skeptic often assumes an adversarial posture, and thinks only of how to attack Esperanto

and your support of it, ignoring the content of all your responses. Some people are so firmly committed to hostile defense of their ignorance that discussion is useless. Others, who are just unsure about themselves and any unknown subject, simply *adopt* an adversarial role as a defense mechanism. The best chance of changing the atmosphere of discussion into an amicable, productive one is with a sort of rhetorical aikido, in which the attacker's own arguments and energy are used to sway his position, rather than being directly resisted. Three elements of strategy are needed to make this success-

ful: we must understand the skeptics' arguing technique, respond in an unexpected way (generally agreeing with them instead of disagreeing), and get them to think more deeply about their own views and arguments, as a preparation to thinking about other points of view and new information.

Let us imagine a typical conversation between a potentially convinceable skeptic, Mr. Ian P. Dubon, and our skillful *varbisto*, Vera K. Saĝul. Ian comes on as a negative know-it-all, because that style

Continued on page 8

Promoting from page 7

seems “cool” in our society, and it protects him from having to express his true viewpoints. This is a good defense mechanism. Ian doesn’t really care about the reasoning that he presents, so he doesn’t have anything to lose, if Vera shoots holes in it. Ian says, “Esperanto will never have as many speakers as English, so why should I learn it?” Of course, Mr. Dubon is not studying Chinese, which shows that he really doesn’t care how many speakers a language has. Good move! Ian has set up a clever decoy to draw Vera’s fire.

Vera is in a tight spot. She can’t dodge the question, but even the most withering rebuttal will leave Ian unscathed. In fact, he’s so busy preparing his next decoy argument that he’s hardly paying attention. Vera knows he is looking for an argument, so she throws him off balance by agreeing with him. “*Jes*,” she says (shoving in a little Esperanto to get things rolling). “English is definitely the biggest international language right now.” Vera notes that her surprise agreement has recaptured about half of Ian’s attention. She presses her advantage by asking him a personal question. “Have you ever travelled to another country?” “Yeah, I’ve been to Europe a couple of times.” “Where’d you go?” “Well, I visited my brother when he was stationed near Frankfurt, Germany, and then visited London and Paris.”

Vera continues her questioning, knowing that she must get Ian personally involved in the discussion. “Which did you like best?” Ian goes through his memories, only partially conscious of how nice it is to have someone take an interest in his personal experiences. “Well, it was great to see my brother, and he knew the place, so he could kind of show me around.” Vera, fully aware that her eagerness to learn about his travels will stimulate Ian’s interest in her experiences, says, “I’ve never been to France. What was that like?” “It was really interesting. I saw the Eiffel Tower, Notre Dame, all that stuff that I knew from books. It’s so much more impressive in person.” Vera returns to the language issue. “How did you talk with people, do you speak any French?” Ian senses a trap. “Well, I’ve studied a few years of it in high school, but I just used English. Everyone speaks it over there.” Vera plays her trump. “You know, I’ve heard that the French sometimes won’t speak English, even when they know it. Did you find any of

that?” Ian responds vigorously, remembering his tourist problems. “They are so **arrogant**. They always know enough English to take your money, but when you need some help, suddenly they forget it all. It’s like a game, they seem to enjoy making things difficult for Americans.”

“I couldn’t have said it better myself,” thinks Vera. There is no need to press that point any further, so she takes up another issue. “I bet you saw a lot more when you were with your brother.” “Yeah, we did all the touristy stuff in the first few days, but then he showed me things that I never would have found on my own. There are some really great old castles in the area that no one ever goes to. And we went biking along the river there, they have these beautiful bike paths for hundreds of kilometers. It’s great.” Vera senses that she has found the key for gaining Ian’s interest. “That’s what I found when I was

To influence a skeptic, our strategy is to change the tone of the discussion

in Europe. When I visited some place alone, it was interesting, but when I had someone to show me around, then it was really exciting.” Now it’s Ian’s turn to ask, “Do you have family over there?” “No,” Vera replies. “When I first went over, I didn’t know anyone. But I went to an Esperanto congress, and made a bunch of new friends, who invited me to come visit them. So I did. And almost everywhere I went, someone would call up one of their Esperanto friends in the next place I was going, to arrange a contact, and often get me a place to stay.” “Now wait a minute, are you saying that perfect strangers would invite you into their homes just ‘cause you speak this silly language?” “Uh-huh.” “That’s really weird. Tell me more about this...”

And so we leave Ian Pasantan Dubon and Vera Konvinka Saĝul discussing where they’ve been and what they’ve

done. Ian still has some questions and doubts, but he is now truly interested in hearing Vera’s answers. By showing a genuine interest in Ian, asking questions, and not pressing her argument, Vera broke the adversarial relationship, and established friendly communication. The *varbado* can come later.

To influence a skeptic, our strategy is to change the tone of the discussion. Three tactical elements are often useful: ask direct, personal questions about the skeptic’s views and experiences; limit the amount of information that you try to present; and speak chiefly from your own personal experiences. Questions can be of a personal nature, as detailed above, or they may be more scientific, for example asking the skeptic’s viewpoints on how well English works, where, with what results, economic, social and political consequences. Ask what an international language needs to be effective. Ask how well English meets these criteria. With a little practice, it is not hard to guide a conversation entirely with questions. These questions will also tell you what is important to the skeptic, so that you can guide the discussion effectively. When the skeptic sees that his own views contradict his conclusions about English in an international role, he may begin to ask about Esperanto (perhaps with the hope of showing that it *also* lacks what is necessary). Resist the urge to flood him with information and proof. If one is humble, and concise in answering, the questions will continue. Proceed slowly. Stimulate a little interest, give a little information, and stimulate their curiosity. Speak about what Esperanto gives to you. Your personal experiences may be more inspiring and convincing than academic studies, and are more likely to be believed. Be honest about what you like and don’t like in the movement. Honest criticism will often elicit trust and acceptance in a way that hyperbole and effusiveness never can.

Only after we replace the adversarial relationship with an interested, friendly one, get the skeptic personally involved with the discussion, and show a genuine interest in their viewpoint, can we give a little information about Esperanto. We don’t need to answer all their questions and tell them all the reasons for studying the language. If we leave them wanting to find out more about us and about Esperanto, we will have made the most convincing, lasting and effective argument.

Ĉu Esperantistoj kapablas kompreni satiron?

de Bernard Golden

[Longtempaj legantoj de la ELNA Newsletter kaj aliaj Esperantaj gazetoj certe rekonas la nomon de Bernard Golden. Lia nomo jam eniris la vortprovizon de nia lingvo (dubantoj vidula finan paĝon de la nova romano de Lorjak, Kromosomoj, nun havebla ĉe ELNA). Kelkaj el liaj prilingvaj eseoj jam aperis en la verko *Marĝene de la lernolibro* (ankaŭ havebla ĉe ELNA). Inter liaj klasikaj satiroj laste troviĝas, en La Kancerkliniko n-ro 50, la artikolo "Tri buŝtoj en Esperanto", kiun mi ne rajtas reprodukti ĉi tie pro timo pri postenperdo.]

Mi atendis reagojn rilate la enhavon de la artikolo "Malfidinda statistikado en Esperantujo" (ELNA NL 1989(2), pĝ. 7-8). Unue alvenis detalplena letero de la redaktoro, kaj poste li aperigis kelkajn koncizajn komentojn fine de mia artikolo. Analizinte la ĉinan analiz-metodon, s-ro Harlow sagace konkludas, ke ĝi "ne estas statistika analizo, nur fantaziado", kaj ankaŭ skeptike aldonas: "Ĉu ĝi estis pli apliklebla al antaŭmilita Ĉinio ol al la nuna situacio, tion mi efektive dubas."

Por forigi ĉiujn dubojn, tiujn de la redaktoro kaj ankaŭ tiujn de legantoj de ELNA NL, mi nun malkovros la sekreton de la "ĉina analiz-metodo". Mi mem ne elcerbigis ĝin, sed ĉerpis ĝin el la artikolo "statistiko" en *Enciklopedio de Esperanto* (1933-1934, vol. 2, pĝ. 501-503). Ĝi enhavas plurajn kolumnojn da ciferoj, sed ĉe la fino la aŭtoro konfesas, ke ilia valoro kaj fidindeco varias, kaj ofte ne estas eble kontroli la ĝustecon de diversaj nombroj. Sekvas jena komento pri Ĉinio.

Oni povas multe konkludi el la suba proksimuma "statistiko" pri E. en Ĉinio, kvankam ĝi estas ĉefe nur imagita takso.

Leginte tiujn vortojn kaj ekzameninte la "statistikon" pri la nombro de ĉinaj esperantistoj en diversaj kategorioj, mi tuj tiris konkludon, ke la tuta afero estas bela blago el trans la Granda Murego.

S-ro Harlow pravas kiel pulvo, kiam li karakterizas la geometrian progresion 30, 300, 3000 ... kiel analizon sen pravigo, starigitan tute apriorie. Estas ja evidente, ke tiu progresio baziĝas sur la konstanta kvanto 10. Nu, kial ĝuste dek? Simple, ĉar la ĉinoj, same kiel mi, uzas la decimalan [dekuman -red.] sistemon! Se la nahŭatle parolantaj aztekoj estus far-

inta la statistikadon, ilia obliga konstanto estus 20, ĉar ili havis vigesimalan [dudekuman -red.] sistemon. Kaj imagi, kiel aspektus statistikoj pri babiloniaj verdstelanoj, kiuj havis seksagesimalan [sesdekuman -red.] sistemon bazitan sur proporcioj de 60! Laŭ mia interpreto, en 1934 iu flavhaŭta farsulo enŝovis en numeron de *Kantona Esperanto-Gazeto* tiujn falsajn statistikajn donitaĵojn, kaj la redakcio de *Enciklopedio de Esperanto* komplice reprenis ilin, eble por reliefigi la mankon de fidindeco de statistikoj troviĝantaj en Esperantaj publikigaĵoj. Mia uzo de la "ĉina analiz-metodo" por trakti ankaŭ la "oficialan" statistikon de UEA pri la tutmonda esperantistaro estas ankoraŭ unu aspekto de tiu vola mistifikado, ĉar mi celis verki satiran artikolon pri tiu temo. Sed kiom da esperantistoj, kiuj legis ĝin, tiel komprenis mian intencion? Laŭ ĝisnunaj spertoj, mi opinias, ke malmultaj rigardis ĝin kiel satiron.

La sama sorto trafis pli fruan artikolon, en kiu mi aplikis la "ĉinan analiz-metodon" al aliaj malfidindaj taksoj pri la nombro de esperantistoj en la mondo (1). Ĉu povas esti, ke la "ĉina analiz-metodo" ŝajnas tiel racia kaj matematike alloga, ke la legantoj de tiu artikolo senpripense akceptis la konkludojn? Verdire, la plej granda seniluziigo por aŭtoro ne estas malfavoraj kritikoj pri la ideoj esprimitaj en liaj verkoj sed blinda miskompreno aŭ totala ignorado (2).

En la pasinteco mi ricevis kelkajn surprizajn reagojn post publikigo de satiraj verkoj. Unu temas pri anonco aperinta en la revuo *Fonto* pri nova periodaĵo titolita *Kloako* (3). Ties celo estas publikigi ĉiujn verkojn, kiujn la redakcio de *Fonto* rifuzas pro ilia malalta beletra kvalito. Tiel *Fonto* povas resti pura, dum *KLOAKO* ensorbis la verdan literaturan rubaĵon. Kредu tion aŭ ne, entuziasma polino skribis al mi por proponi sin kiel kunlaboranton de *Kloako*, kaj el Ĉinio burĝonanta juna poeto sendis al mi plurajn poemojn por la nova revuo.

La dua ekzemplo rilatas al artikolo, kiun mi verkis por *Monato* pri la horizontala metodo de lingvo-lernado (4). Ĝi bezonas nur liton kun instruantino kaj

lernanto aŭ instruanto kaj lernantino. El Nederlando venis perletera malaprobo de la horizontala metodo. Mi konjektis, ke tiu ulino, kiu instruas Esperanton laŭ la Ĉe-metodo, maltrankviliĝis, ĉar ŝi timis, ke ŝiaj gelemantoj amase forlasos ŝiajn kursojn, kiam ili ekscios pri la horizontala metodo.

Ankoraŭ unu ekzemplo de satiro, kiu altiris seriozajn rebatojn, koncernas mian proponon aldoni al la Fundamenta Gramatiko de Esperanto novan regulon, la 17-an: "Se oni ne scias, kiel diri ion en Esperanto, oni uzu anglan vorton aŭ esprimon" (5). Mi celis per tiu satiraĵo riproĉi la uzon de anglaj vortoj en Esperantaj tekstoj (ekzemple *best seller*, *slow motion*, *week end*). Jam atingis min du reagoj, unu de franco, kiu uzas anglajn vortojn en siaj verkoj, kaj la alia de la redaktoro de hungara periodaĵo, kiu per longa artikolo provis demonstri, kial la 17-a regulo ne estas bezonata!

Nun mi havas gravan problemon: ĉu valoras aŭ utilas publikigi satirajn verkojn en Esperanto, se legantoj ne kapablas kompreni, ke temas pri satiro? Ĉar diverslandaj esperantistoj mise reagis, mi demandas min, ĉu satiro estas universala komprenebla, aŭ ĉu tiu esprim-maniero estas fremda al kelkaj kulturoj?

Notoj

1. Statistikaj donitaĵoj pri la nombro de esperantistoj. *Heroldo de Esperanto*. 1987; 16(1787): 3.
2. Eĉ nesatiraj, tute seriozaj pretraktadoj de la nefidindeco de publikigitaj statistikoj pri esperantistoj en la mondo aŭ en apartaj regionoj ne havas sobriegan efikon, ĉar senĉese aperas en la verda gazetaro plej fantaziaj, senhonte ŝveligitaj nombroj. Ĉu mi vane verkis la sekvajn artikolojn?
 - a. Kelkaj demandoj pri popol-nombro en Esperantujo. *Dia Regno*. 1987; 1/2: 2785-2786.
 - b. Kiom da idoj havas Esperantujo? *Bulteno de Universala Ligo*. 1987; 1-2: 38-40. Publikigita ankaŭ en: *Esperanta Mormonaro*. 1988; 15: 3-5.
 - c. For la falsajn statistikojn pri esperantistoj kaj parolantoj de Esperanto! *Bulteno—La Londona Esperanto-Klubo*. 1987; marto-aprilo: 3.
 - d. Verda statistikado ne ĉiam estas vera. *La Kancerkliniko*. 1987; 41: 20-21.
 - e. Kiom da esperantistoj estas en Afriko? *Esperanta Mormonaro*. 1986; 12: 3-4.
3. Lanĉo de *Kloako*—malbeletra revuo. *Fonto*. 1983; 37: 35-36. Publikigita ankaŭ en: *Lumo*. 1986/1987 vintro: 19.
4. Lingvolekado laŭ la horizontala metodo. *Monato*. 1983; 11: 10-11.
5. La 17-a regulo: Pri la uzo de la angla lingvo en Esperanto. *Latinamerika Memaro*. 1988; 4: 3-4.

[Redaktora noto: La plej sukcesaj satiroj ne estas tiuj, kiujn ĉiuj legantoj tuj rekonas kiel satirojn, sed fakte tiuj, kiujn kelkaj (tamen malmultaj) homoj traktas kiel tute seriozajn; en tiu senco, mi opinias, ke per la supre menciitaj artikoloj s-ano Golden fakte trafis la celon. Mi supozas, ke ankaŭ Jonathan Swift, modeste proponinte, ke anglaj nobeloj fritu irlandandidojn por koloniano, ricevis plurajn kolerajn leterojn de aristokratoj, kiuj supozis lin tute serioza.]

"COMPREHENSIVE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY"

by Doug Portmann

What Is It?

Most of the readers of *ELNA Newsletter* are aware of the existence of an unpublished English-Esperanto dictionary more complete and up-to-date than any now in print. Its author is Pete Benson, who lives in Maryland. But many may know little beyond that. The purpose of these articles is to inform readers about this dictionary, which currently exists in manuscript form.

It has long been desirable to have access to the PIV, the "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (Complete Illustrated Dictionary of Esperanto), which was published in 1970. This is an all-Esperanto dictionary, and occupies the commanding heights of Esperanto lexicography. If one has memorized this entire work and knows the English equivalents to every entry therein, no better access is needed. (And you are probably ready for membership in the Esperanto Academy!)

For us ordinary mortals, however, a good English-Esperanto key is necessary to unlock the riches of PIV, and none has been published. But the "Comprehensive English-Esperanto Dictionary" (CEED) will be such a dictionary. Such a dictionary will give the saucy neologism "lanta" as well as the standard translation "malrapida" for English "slow." Or it will tell you that English "host" can be translated "mastro" as well as "gastiganto," depending on the precise meaning of "host."

CEED will be unique in that it is an American creation, giving preference to American English spelling. No more will you have to look in a dictionary and find out a car "tire" is allegedly a "tyre," or "sulfur" is masquerading as "sulphur." Isn't it about time that these colonies finally declare their independence from Great Britain?

The manuscript amounts to 1149 double-spaced pages, which gives some idea of CEED's completeness. The author makes free use of labels to distinguish various meanings and nuances of English words, which is commendable. Thus "grind" is translated as "mueli" if corn is being ground, but "ŝlifi" if one is talking of natural erosion. Here is the entry for "lime":

lime, (chem), kalko; (fruit), limeto; (tree), limetarbo; (linden tree), tilio; -ade, limetado, -kiln, -forno; **bird-**, birdogluo; **brook-**, bekabungo; **quick-**, kalcia oksido, kaŭstika kalko.

A great asset of CEED is its painstaking treatment of English words that have a myriad of meanings, like "get" or "run."

CEED will be unique in that it is an American creation, giving preference to American English spelling

Thus the entry for "get" takes up two pages, and includes many expressions using "get" like "get along" (elteni, pace interrilati), "get away" (foriri, eskapi), "get in with" (asociiĝi kun), and "get through" (fini, trairi, travivi, etc.). Another useful feature is that some entries are used in sample sentences (both English and Esperanto) to give you a better feel for them. Thus the expression "as much as" is illustrated in the following way:

I like jazz as much as classical music:
mi ŝatas ĵazon egale kiel la klasikan muzikon.

The inclusion of such tidbits makes scanning through CEED a pleasant way to spend an evening.


Another advantage of CEED is that it gives the transitivity of all verbs in Esperanto, which is important for their proper use. However, verbs having the verbal suffixes -ig/ or -iĝ/ are not so marked, since they are always transitive or intransitive respectively.

CEED uses a goodly number of new root words, and a glossary of them may be found at the end. A number of them are American or foreign place names overlooked by PIV: Ĉesapika (Chesapeake), Gaspeo (Gaspé), or Vinipego (Winnipeg). Other include bingo, epicentro (epicenter), and stibio (antimony). Notable is the author's effort to list the many words that have come into general usage in recent years from the field of computer technology. Sometimes the words listed as neologisms, like "kasedo" (cassette), have since been included in the Supplement (1987) of PIV.

Not every entry in PIV is included in CEED. Some more technical words are left out. Also left out are some traditional Esperanto terms that have been largely replaced by other words. For example, the traditional Esperanto word for "army" is "militistaro," which has been replaced by "arneo." Both are used in the London Bible (Sankta Biblio), but there "militistaro" refers to an earthly army, while "arneo" usually is the heavenly army, or host of heaven.

It is difficult to say how close CEED is to publication. The manuscript of CEED is currently being reviewed by a number of Esperantists. It could be published next year, especially if the reviewers show sufficient zeal. According to a Canadian literary consultant, it should be possible to have CEED published commercially for a profit. CEED was done on a Macintosh computer and thus exists in computer-readable form. The final draft can be printed out on a laser printer to give a quality almost as good as typeset text. I hope it will be bound in a hardcover edition, which will increase its durability and make it more attractive for donation or sale to libraries.

In future articles, I would like to explore some types of vocabulary used in CEED, such as science and technology, business and law, American foods (especially junk food!), and sports. Many such English-language terms have not yet received stable Esperanto equivalents. Our discussion will look at how CEED and other authorities have handles these terms.



LETTERS

[*Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.*]

[**Michael Larkin estas respondeculo pri la librodonaca fonduso "Semoj".**]

Dankon pro aperi anonceton pri la librodonaca fonduso "Semoj" en la *ELNA Novaĵletero*. Estas bedaŭrinde, ke oni ne indikis la adreson. Simila anonceto en la revuo de UEA *esperanto* rezultigis gratulojn kaj informpetojn el Brazilo, Pollando, Sovetunio, kaj Togo. "Semoj" ja estas ĉefe miĉigana afero sed ni ĝis nun sukcesis helpi al ĉiuj, kiuj petis helpon (ĉar ni ja ankaŭ estas esperantistoj!)

Ni kredas ke la usona esperantistaro povus fari multe pli ol ĝi efektive faras. "Semoj" estas tre serioza entrepreno kaj ĝis nun sukcesa. Ĝi jam donacis 35 ekzemplerojn de *Esperanto: Learning and Using the International Language* kaj ankaŭ ekzemplerojn de diversaj aliaj libroj.

La redaktoro de *La Semanto* antaŭ nelonge petis, ke mi verku artikolon. Mi jam tion faris kaj sendos al vi ekzempleron. Mi ankaŭ nun preparas novan ĉirkuleron, kiun mi sendos.

Michael Larkin
[*Por tiuj, kiuj interesiĝas pri la ebleco kontribui al la laboro de "Semoj", jen la adreso: Michael Larkin, 3904 Beadle Lake Drive, Battle Creek, MI 49017. Pri donado de libroj ĝenerale, aperos en la venonta jaro artikolo pri tiu temo de Doug Portmann, kunverkinto de la nova Biblioteka Terminaro.*]

[**Sajnas, ke la "Fina solvo de la usona problemo", kiu aperis lastatempe en la ELNA Novaĵletero, tamen ne estas fina. Jen reago de Robert R. Dwelley.**]

La artikolo "Fina solvo de la usona problemo?", kiu presiĝis en la lasta numero de *ELNA Newsletter*, instigas ĉi tiun leteron.

Depost longe mi estas tre ĉagrenita de la vorto "Usono" kaj ties derivaĵoj. Tiu ofta termino por nia lando, bazita sur la frazero "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko", falsas kaj eraras. La oficiala

nomo de la lando estas "United States of America", ne "...of North America". Kiu rajtigis, ke la esperantistaro donu al ni la esperantan egalajn de tiu lasta, nomon, kiu ne apartenas al ni?

Tute tra historio, nomo estas preskaŭ sanktaĵo. En la juda tradicio, ekzemple, nomo ne nur identigas aĵon, sed preskaŭ estas tiu aĵo. En ĉi tiu vivo, persona nomo estas unu el la malmultaj aferoj, super kiuj oni povas teni regon. Do, pro respektu, oni nomu estaĵon, kiel volas esti nomata tiu estaĵo.

Lastatempe Eburio petis, ke la mondo nomu ĝin laŭ la franca formo, Cote d'Ivoire. Ni devus respekti tiun peton, ĉar per tiu formo tiuj landanoj elektis nomi sin.

Mia nomo estas Robert; oni ne rajtas nomi min Bruce aŭ John. Simile, oni ne rajtas nomi nian lando "...of North America"; *tiu ne estas la nomo, per kiu ne elektis referenci nin!* Tial la titolaĉo "Usono" estas arogantaĵo.

Ni ne akceptas la histerian argumenton, ke la uzo de la vorto "America" por identigi nian landon necese insultas aŭ elbaras niajn samkontinentajn najbarojn, sed tiu estas alia afero. Restas la fakto, ke la vorto "America" estas parto de nia nomo, ke ne tiu de iu alia lando en la mondo. Se oni deziras rapidan, facilan manieron, per kiu nomi nin en Esperanto, ĝi estu "Uso" aŭ "Usao"; ni do estu ne "usonanoj", sed "usanoj" aŭ "usaanoj".

luokaze tiu infera "n" for!

Robert R. Dwelley
[*La ĝenerala principo, kiun proponas s-ano Dwelley, certe estas ĝusta; en la nuna momento, povas esti, ke kelkaj gravaj eŭropaj esperantistoj devas pli zorge atenti ĝin. Pri la kazo de "Usono": ĉu multaj el ni, anoj de ELNA, trovas tiun nomon neoportuna, nekonsvena, aŭ eĉ ofenda? Respondojn mi atendas.*]

[**William F. Orr raportas de Hofstra University, kie li nun iom truke instruas Esperanton.**]

Post plurjara kabeĝo mi revenas al la verda mondo, instigite de la kurso, kiun mi instruas nuntempe ĉe la universitato: "Constructed Languages and Interlinguistics". Kvankam mi instruas la histo-

riion de konstruitaj lingvoj kun komparo inter Esperanto, Ido, Völapuk, kaj Interlingua, 60% de la kurso estas baza Esperanto—kiel simpla Esperanto-kurso ĝi malfacile trafus la aprobon de la fakestroj.

La lernolibroj estas du: "A Short History of the International Language Movement" de Albert Leon Guerard (1922), kiun Hyperion Press ĵus reel-donis; kaj "Esperanto" de Richardson. Mi ankaŭ aĉetigis pere de la librovendejo la vortaron de Wells, kiun la lernantoj povas laŭŝate aĉeti. Eble post la fino de la kurso mi verkos artikolon pri ĝia (mal)sukceso.

Ĉi-kune mi sendas [kontribuaĵon, kiun vi eble trovos interesa]. Mi proteste verkis kvarpaĝan leteron al Prezidento Bush (sen espero de Buŝa respondo) pri la kuba situacio. Eble taŭgos citi kelkajn frazojn en la *Novaĵletero*. Estus ankaŭ interese scii, ĉu aliaj ELNAanoj simile protestis.

William F. Orr
[*Pri aliaj mi ne scias, sed mi mem ankaŭ sendis leteron en marto; ĝis nun revenis nenia respondo de la Blanka Domo. Ĉu aliaj samideanoj protestis al la plej granda Buŝo en la lando?*]

PASOJ

DUPLAN

Laŭ informo de Cleo Fort kaj Ellie Stein, d-ro Marcel Duplan, kiu bele priskribis sian pasintjaran viziton inter usonaj esperantistoj en artikolo kiu aperis ĉijare en nia revuo, forpasis la 8an de aŭg. ĉe sia hejmo en Francio. D-ro Duplan lasis multajn geamikojn inter usonaj esperantistoj.

PORTMANN

Maje de 1989 la Eldonejo de Akademijaj Revuoj en Ĉinio publikigis Biblioteka Terminaro kompilitan de Doug Portmann el Usono kaj Koralo el Ĉinio. La terminaro enhavas pli ol 1 300 terminojn bibliotekologiajn, inform-sciencajn, eldonajn, pres-artajn, dokumentajn k.a. Kun kvinlingva indekso en la fino, la libro estas aranĝita en ordo de Esperanta alfabeto kun sam-sencaj terminoj anglaj, ĉinaj, francaj, germanaj kaj hispanaj. La libro, montrante novan disvolviĝon de la biblioteka fako, estas la unua plurlingva biblioteka terminaro presita laŭ Esperanto-alfabeto.

El Popola Ĉinio

SWENSON

La 22an de julio Karen Swenson, Prezidanto de la Esperanto-Societo de Chicago, fariĝis patrino de Elizabeth Ann.

La Semanto

Anoncoj

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La Esperanto-eldonejo ILTIS aperigas novan literaturan revuon en Esperanto. Jam aperis almenaŭ unu numero, kaj ĝi ŝajnas esti atkvalita. Forumo aperos tri fojojn en unu jaro kaj kostos 20 germanajn markojn por la jaro. Avertito: abundas la "iltismoj" (t.e. necesaj neologismoj). Senpagan specimenon, abonilon, informojn sendos al vi laŭmende: **Eldonejo ILTIS, Postfach 1530, D-6670 ST. INGBERT, FR Germanio.**

Se vi volas partopreni en la nova gasta servo de SAT, la Amikeca Reto, petu informojn, aliĝilon, katalogon ĉe: **L'Amikeca Reto, c/o Rollin Gerard, 63 rue de la Republique, Charge- F-37 530 AMBOISE, Francio.**

David Barron, verkinto de la libreto "How to Promote Esperanto", nun

revizias tiun verkon, kaj bezonas informojn pri la informaj metodoj de lokaj grupoj. Tio inkluzivas flugfoliojn, novaĵelsendojn, Publikservajn Anoncojn, ktp. Se vi havas ion por kontribui, bonvolu kontakti lin ĉe: **David Barron, Esperanto of Idaho, P.O. Box 37, EAGLE, ID 83616.**

Movado sen Nomo estas vigla kaj niatempa movado, bazita en Belgio, kiu volas starigi pli bonajn interhomajn rilatojn en ĉiuj politikaj, sociaj kaj ekonomiaj rilatoj. Informoj haveblas, ankaŭ en Esperanto, ĉe: **Movado sen Nomo, Poŝtkesto 137, B-2600 BERCHEM 1, Belgio.**

Por tiuj junuloj, kiuj ne povas partopreni en la 46a Internacia Junulara Kongreso en Kubo, okazos inter la 23a kaj 29a de julio **Kvinpinta Semajno** aranĝata de junaj nordiaj esperantistoj en suda Finnlando. Oni povas ricevi informon de: **Riitta Pulli, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGASALA, Finnlando.**

Ekde septembro, 1989, funkcias en la hungara urbeto Budaors en Hungario

unika eksperimenta unua klaso de ĝenerala lernejo kun 22 ses-jaraj infanoj laŭ la eduka koncepto de psikopedagogo POLGAR Laszlo. Inter la temoj de studado estas ankaŭ kaj Esperanto kaj la angla lingvo. Se vi havas intereson partopreni, eventuale kiel instruisto/guvernisto salajrata, bonvolu kontakti: **LUKACS Andras, Sekretario de la Fondajo Talento, H-2040 BUDAORS, Szirvany u. 4/36, Hungario; tel. (011 36 1) 182-3225 aŭ 173-3008.**

En 1914 oni inaŭguris belan Esperanto-monumenton en la ĉeĥa urbo **Františkovy Lazne**, sed en 1938 la Nazioj komplete detruis ĝin. La Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kunlabore kun UEA, nun kolektas monon por restarigi la monumenton koincide kun la UK en Prago en 1992. Donacinto de 40 guldenoj (proks. \$19) ricevos dankdiplomon; de 400 guldenoj—medalon kun gravurita dankesprimon; de 5000 guldenoj—la nomon gravurita sur la monumento mem. Se vi volas kontribui, bonvolu sendi monon al UEA, **Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando, por la konto "lazzn-g".**

CALENDAR

The calendar is a list of a few Esperanto-oriented events, regional, national and international, that we think would be of interest to some or all of our readers. For your information, we include the primary language(s) of each event.

- 26-28 January 1990:** 3rd International Economists' Symposium. Esperanto. Main topic: Ecology and Economics. Budapest. For information: Fondajo Talento, BUDAORS, Pf. 50, Hungary H-2041, tel. (36 1) 1823-225.
- 24-28 April 1990:** The World In Formation. Languages not indicated (French, English, Spanish, German, Portuguese, Esperanto?), but heavy advertising in Esperanto. Topics: Peace, Development, Ecology, Worldwide Democracy. For information: Komitato de Organizado de la Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo, Poŝtfako 0631, 37006 TOURS CEDEX, Francio.
- 3-25 May 1990:** Basic Acupuncture Course.

Esperanto. For information: S-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio.

11-13 May: BEL Printempa Senkrokodiliga Semajnfino (Springtime Decroixification Weekend) at Headlands Institute, Rodeo Lagoon, Marin County, CA. Esperanto. For information: Berkeley Esperanto League, P.O. Box 324, BERKELEY CA 94701-0324.

25-30 May 1990: 3rd International Academic Conference On Science and Technology in Esperanto in Beijing, China. Esperanto. Includes half-day and all-day excursions in Beijing and its environs; five optional post-Conference excursions in East China are also available. For information: S-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio.

1-20 June 1990: Advanced Acupuncture Course. Esperanto. For information: S-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio.

18 June-6 July 1990: Esperanto Summer Courses at San Francisco State University.

Esperanto, some English. For information: Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., HILLSBOROUGH, CA 94010, tel. (415) 342-1796.

25-30 June 1990: 3rd Annual Midwest Classes and Conference, Milwaukee, WI. Esperanto, English. For information: Esperanto Society of Michigan, P.O. Box 3011, SOUTHFIELD, MI 48037-3011.

7-14 July 1990: Annual Conference of the Esperanto League for North America, Mexico City, DF, Mexico. Esperanto. For information, contact ELNA. Current plans are to combine this with a tourist pre-Congress for the World Esperanto Congress in Havana.

14-21 July 1990: 75th World Esperanto Congress, Havana, Cuba. Esperanto. For information contact UEA.

21-28 July 1990: 46th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Playa Giron, Cuba. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.

23-29 July 1990: Kvinpinta Semajno, southern Finland. Esperanto. For information: Riitta Pulli, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGASALA, Finland.

RECENZE

Piron, Claude: *La Bona Lingvo. Viena/Budapest: "Pro Esperanto"/Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 112 p. Paper. From ELNA: Code BON010, Price \$7.75.*

Post la lastatempa inundo de verkoj favore al la t.n. Iltisa Skolo, la Praga Artliteratura Skolo, kaj la Normala Listo de Landnomoj de la Akademio de Esperanto, mi iomete refeliĉiĝis renkontante ĉi tiun verketon *La Bona Lingvo*.

Tiu Bona Lingvo kompreneble estas Esperanto. En ĉi tiu libro Claude Piron, iama tradukisto por la Monda San-Organizo, nuntempe psikanalizisto (pli ĝuste: plifeliĉigisto) en Genevo, verkinto de la ŝataj (inter esperantistoj) krimromanoj pri Jano Karal, unu el la ĉefaj subtenantoj de la tradicia "skema" Esperanto, klarigas tion, kial li persone opinias Esperanton "bona lingvo", kaj samtempe elokvente pledas por la aglutina Esperanto kaj kontraŭ la pli "Okcidenta" formo, kiun prezentas pluraj aktualaj (ĝenerale eŭropaj) esperantistoj.

Jen iom da fona klarigo por la nova esperantisto. Kvankam oni komence kreis Esperanton en orienta Eŭropo, jam en la fruaj jardekoj de la nuna jarcento—kaj aparte en literaturaj rondo—la regado de la movado transiris al okcidenta Eŭropo, kvankam la pliparto da parolantoj restis en orienta Eŭropo kaj, hodiaŭ, Azio. La francoj aparte grave rolis en la evoluigo de la lingvo, kaj sekve oni transportis la praktikojn kaj antaŭjuĝojn de la francoj al la "oficiala" Esperanto ĝis eksterordinara grado. Unu franca praktiko/antaŭjuĝo estas troiga deziro por lingva ordo; tion oni povas vidi en la *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, kies kunverkinto estas franca intelektulo Gaston Waringhien; tiu verko, kiel pri-skriba dokumento, devas esti sur la librobreto de ĉiu serioza esperantisto, sed kiel *preskriba* dokumento ĝi estas forbruligenda. Alia praktiko/antaŭjuĝo estas la emo trakti Esperantajn vortojn kiel francaĵojn anstataŭ kiel Esperantaĵojn; tiu bedaŭrinda situacio preskaŭ preterripare makulas la nuntempe definitivan *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, mem verkaĵon de la nela-

cigebla Waringhien. Simila ekzemplo troviĝas en lastatempa numero de la publika bulteno de la Akademio de Esperanto, en kiu la Akademia Prezidanto, Prof. Andre Albault, parolante pri mitaj vizitantoj de la stelo Siriuso, mencias ilian "avancitan civilizacion"—ne rimarkante la fakton, ke en Esperanto la verbo *avanci* estas netransitiva, kaj do ne povas havi pasivan partupon (laŭ mia *Petite Larousse*, en la franca lingvo *civilisation avancee* estas tute tolerebla).

Tiujn francajn praktikojn, truditajn al Esperanto, Piron priskribas kaj atakas en sia libreto, kaj tion farante li kritikis eĉ la nekritikeblan Waringhien mem (paĝoj 76-82), kiun Piron akuzas, i.a., pri tio, ke li "ne konscias la riĉecon de Esperanto" (p. 82).

En specifaj terminoj, tio estas eble bedaŭrinda, ĉar Waringhien estas unu el tiuj "naturalismemuloj", kiuj—laŭ la usona esprimo—bojas pli ol ili mordas. Kion li teorie skribis en 1932 pri la miselvokiveco de la mal-vortoj (Piron citas detale), tio verŝajne neniam malhelpis lin, almenaŭ en la ordinara prozo, utiligi tiajn vortojn—kontraste kun de Diego, kiu ĉiam preferas senmalan neoftaĵon. Waringhien cetere ne subtenas la ekscesojn de Karolo Piĉ (vidu ekz. duan alineon sur p. 111 de la tria eldono de *Parnasa Gvidlibro*). Kaj li ŝajne estas ĉiam preta rezigni pri siaj amataj francaĵoj antaŭ la premo de populara uzado (ekz. la ŝanĝo de *kaseto* en PIV al *kasedo* en la Suplemento).

Pli ĝenerale, tamen, la pensema esperantisto devas ĝis alta grado konsenti kun Piron, kies pledo por la tradicia, aglutina Esperanto alvokas la aktualan emon al demokratio:

Se, anstataŭ la cititaj vortoj [*pediatro, miokardio, diakrona, aŭtoktono, monokromata, eŭfonie*], la preleganto aŭ verkanto uzas vortojn kiel, respektive, infankuracisto, kormuskolo, tratempa, praloĝanto, unukolora, belsone, ne necesas aparteni al la greklatina kulturmondo por tuj kompreni: ĉesas distingiĝi la klasoj lingve nobela (hispanoj, francoj, italoj, kleraj anglalingvanoj...), grandburĝa (germano, skandinavo), burĝa (rusoj kaj slavoj ĝenerale), etburĝa (hungaroj,

nekleraj homoj diverslandaj...) kaj popola (azianoj, afrikanoj...): la rilato demokratiĝis. (p. 88).

(Tio memorigas min pri iu kritikanto de Esperanto, kiu plendis, ke la aglutinaj vortoj de la lingvo fakte ne estas nuraj vortoj, sed plenaj difinoj. Se jes, tiel estu! Tio povas esti granda helpo por la kompreno flanke de ordinara homoj. Mi neniam komprenis, ĝuste kio estas "miokardia infarkto"—supozeble *myocardiac infarction* en la angla—ĝis, en sia iama artikolo pri "La Okcidenta Dialekto de Esperanto" kiu aperis en *esperanto* en 1977, Piron tradukis ĝin en "la bonan lingvon" kiel "kormuskola tuboŝtopo". Nun mi jam ne devas lerni la grekan kaj latinan lingvojn por kompreni tiun terminon en Esperanto.)

Ankaŭ al Zamenhof Piron plurfoje alvokas. La "naturalismemuloj" ofte subtenas sian sintenon je la 15a regulo de la gramatiko, sed malofte mencias la Zamenhofan "Lingvan Respondon", n-ro 52 (p. 34-35 de *Lingvaj Respondoj*, sesa eldono, kiun redaktis Waringhien), en kiu Zamenhof pli-malpli deklaras la "fremdajn vortojn" nur tolereblaj kontraste kun la "pure Esperantaj" formoj; tiun respondon Piron citas (kvankam en bedaŭrinda kripligita formo) sur p. 94 de la nuna verko. (Estas interese, ke jam en 1911 en tiu respondo Zamenhof lasis sin esperi, ke iam malaperos el la lingvo ĝuste la formo *civilizacio* favore al la "pure Esperanta" *civilizo*; sed ankoraŭ en 1989 la Prezidanto de la Akademio, kontraste kun la ĝenerale esperantistaro, opinias tiun formon uzinda, kiel bv. rimarki supere.)

Oni povus skribi multon pli pri ĉi tiu interesa verko, sed estus pli bone lasi al la leganto mem legi ĝin. La kosto estas malalta, la presado estas bona (neoftaĵo por verko de HEA!), la stilo—Piron kutime verkas en "la bona lingvo"—permesas sufiĉe rapidan tralegadon, eĉ por la nur meze kapabla esperantisto. Mi rekomendas ĝin, kaj aparte la konkludojn de Piron pri la estonteco de la literatura lingvo (p. 95-111), al ĉiu esperantisto konfuzita de la nuntempa fanfaronado pri la bezono por amaso da "neologismoj" (pli bone: "maloftaĵoj").

—Don Harlow



VOLAS KORESPONDI

Amikeco translimoj

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon inter linioj en adreso.

BULGARIO

Petar PANAJOTOV, str. "Bratja Ĉaplikovi No. 85 Vhod "5" apt. 16, 4004-PLOVDIV. 26-jara fraŭlo, pri historio, vojaĝadoj, folkloro kaj ĉiuj temoj.
Dragana GALABOVA, Str. L. Tenĉeva 3, 4225 PERUŠTICA. 35-jara edzino kun du filoj, interesigas pri bildkartoj, legado, muziko, fremdaj lingvoj, parolas ankaŭ itale, pole, ruse, serĉas amikinojn en Usono.
Lilija Pavlova KOLEVA, Bulev. Cvetko Radojnov n. 10-2., SOFIA 1527. Serĉas literamikojn en Usono.

CEROSLOVAKIO

Vladka URBANOVA, Konopistska 1652, BENESOV U PRAHY 256 01. 14-jara lernantino de gimnazio, komencantino.
Silvia RISNOVSKA, Kovacska 1249, 925 22 VELKA ULANY. 16-jara studentino en pedagogia mezlernejo, volas korespondi kun knabo aŭ knabino en Usono.
Lenka KRAKOROVA, Slezska 45, PRAHA 3, 130 00. 21-jara oficistino, studentino de juro, interesigas pri filmoj kaj vivo de junaj homoj tra la mondo.
Petr JANDA, U Cvicliste 11, 312 16 PLZEN. 24-jara poŝtisto, pri personaj interesoj, interŝanĝos bk, pm.
Zita TOTHOVA, Bartokova 30, 949 01 NITRA-ZOBOR. 26-jara oficistino, kun junaj homoj, pri naturo, vivo, homoj ktp.
Jana SKOPCOVA, Dukelska 1585, BENE-SOV U PRAHY 256 01. Knabino, komencantino.

HUNGARIO

MATYAS Renata, TOKODUVEGGYAR, Ady c. u. 14. 11/9, 2532. 13-jara knabino, interesigas pri libroj, filmoj, pop-muziko, ŝatas legi kaj danci, kolektas fotojn, afiŝojn kaj insignojn pri Sylvester Stallone, Patrick Swayze kaj Tom Cruise. Prefere kun knabo aŭ knabino.
Aleksandro KIRALY, 87 Rakoczi u., 6801 HODMEZOVASARHELY. 30-jara presisto, kun samideanoj kiujn interesas la diversaj medicinaj problemoj, kolektas gazetojn, librojn, kaj sciencajn artikolojn pri tiaj temoj.

NIGERIO

Babatunde OLUFUNWA, P.O. Box 265, SHOMOLU, Lagos State. 11-jara knabo, hobiaj estas legado, sportoj kaj elektroniko, kun junaj esperantistoj.
Harry OLUFUNWA, P.O. Box 265, SHOMOLU, Lagos State. 22-jara studento, pri ĉiuj temoj.

POLLANDO

JEZEVSKA Marcena, Borovlec 15/4, 63-450 SOBOTKA, woj: Kallskie. 13-jara lernantino, interesigas pri plastiko, geografio, Esperanto, filmoj, kolektas bk kaj pm, ŝatas florojn kaj bestojn.
Alina GLOWIAK, Sobotka 130, 63-450 SOBOTKA, woj. kaliskie. 13-jara lernantino, interesigas pri bestoj, filmoj, Esperanto kaj gimnastiko.
Maciej JANTOS, ul. Zapolskiej 16/13, 43-100 TYCHY. 13-jara, interesigas pri aŭtoj, hokeo sur glacio, kolektas pm kaj bk.
Beata SZYTKONSKA, Rzeplino, 73-116 KOLIN, woj. Szczecin. 17-jara lernantino, interesigas pri kulturo, filatelio.
Tomasz KAWKA, ul. Strizanska 59, 05-126 NIEPORET, Koty Wegierskie, woj: Warszawskie. 17-jara, interesigas pri turismo, kulturo.
Gabriela ROGOWSKA, KRAKOW 30-075, ul. Raclawicka 20-24,38. 18-jara fraŭlino, lernas en teknikumo, interesigas pri muziko, Esperanto, horoskopoj, kolektas bk, volas profundigi sian lingvokonon.
OIZOT Janusz, ul. Działkowcow 8/7, 41-604 SWIELOCHTOWICE 4, woj. Katowice. 19-jara, interesigas pri turismo, kulturo.
Joseph URBACZKA, Jaworzynka 622, 43-476, woj: Bielsko-Biala. 19-jara, interesigas pri turismo, kulturo.
Marzena KOT, ul. M. Reja 24/17, 41-404 MYSTOWICE 4. 20-jara studentino, interesigas pri geografio, sporto, turismo kaj filatelio, kolektas pm kaj bk.
Dorota LOMBARA, ul. Kr. K. Wielkiego 1/22, PL-39-100 ROPCZYCE. 21-jara studentino, interesigas pri turismo kaj fremdaj lingvoj, kolektas bk kun katoj kaj hundoj, ŝatas diskotekan muzikon.
Beata KRUKOWSKA, ul. Marszałkowska 15, PL-35-215 RZESZOW. 21-jara studentino, interesigas pri turismo kaj fremdaj lingvoj, kolektas bk kun katoj kaj

hundoj, ŝatas diskotekan muzikon.

Mirosława BAK, 62-585 SLAWSK 30. 22-jara esperantistino, interesigas pri muziko, arto (precipe pentroarto), kino, literaturo, volas profundigi la lingvokonon kaj ekkoni novajn geamikojn.
Anna PKALSKA, Ruszelczyce 29, 37-755 KRZYUCZA, woj. przemyskie. 23-jara, interesigas pri turismo, kulturo.
Renata CISZEWSKA, ul. Wojska Polskiego 8/73, 34-400 NOWY TARG. 23-jara, interesigas pri turismo.
Jola BOREK, ul. Wielkopolska 49 m 19, 44-335 JASTRZEBIE-ZDROJ. 23-jara fraŭlino, interesigas pri turismo, kulturo, Esperanto.
Zbigniew LASKOWSKI, 43-100 TYCHY, ul. Darwina 7/38, w. Katowickie. 23-jara viro, nova esperantisto, interesigas pri turismo, muziko, fotografio.
Grazyna ZAWADA, ol. Dainaslaskie, ul. R. Luksemburg 5/7, 97-400 BERCCHATOW. 24-jara esperantistino, interesigas pri Esperanto, turismo, kulturo, literaturo (aparte poemoj).
Anna KOWALEWSKA, ul. Hawatska 18 m. 6, 02-776 WARSZAWA. 24-jara, interesigas pri geografio kaj muziko, kolektas bk kaj turismajn prospektajn.
Wanda BLASZCZYK, Uchan Dolny 9, 99-420 LYSZKOWICE. 24-jara fraŭlino, interesigas pri turismo, kino, muziko, ŝatas legi librojn, ŝatas vojaĝojn kaj migradojn kun dorsosako.
Renata PERZYLO, 32-003 PODLEZE 326. 25-jara interesigas pri turismo.
Bożena CHRON, 43-300 BIELSKO-BIALA, ul. Czwartakow 5/45. 25-jara virino, interesigas pri problemoj de la ĉiutaga vivo, turismo, volas profundigi la lingvokonon.
Barbara BASIAK, 26-214 ZABOROWICE 81, Kielce. 25-jara, por profundigi la lingvokonon.
Mariola ZACZYNSKA, ul. Nowotki 8A m 18, 08-101 SIEDLCE. 25-jara studentino, interesigas pri literaturo, kulturo kaj filmo, tre ŝatas gajajn kaj ŝercemajn homojn, estimas individuismojn kaj sincerecon.
Jolanta WARDA, 24-101 GOLAB, ul. Ogródowa 35. 25-jara instruistino, interesigas pri turismo, muziko kaj geografio.
Leszek T. KLUZA, 88-140 GNIEVKOVO, ul. Torunska 17a. 26-jara fraŭlo, poŝtisto, interesigas pri sporto, kolektas pm, flagetojn.

Volas Korespondi continued

Slawomir SZCZYGIET, ul. Baltowska 323, 27-400 OSTROWIEC. 26-jara viro, interesigas pri turismo, muziko, sporto, geografio, literaturo, historio, kolektas bk, pm.

Mariusz MAJ, ul. Dabrowki 5/91, 86-300 GRUDZIADZ. 27-jara kemia inĝeniero kaj muzikisto, interesigas pri negra distra kaj ĝaza muziko kaj pri kat- kaj hund-rasoj.

Roman PATALITA, Dymitrow Duzy 107, 39-451 SKOPANIE. 27-jara fraŭlo, brunhara, interesigas pri turismo, sociologio.

Malgorzata MATEUSIAK, ul. Szarych Szeregow 3m4, 56-500 SYCOW. 27-jara, interesigas pri turismo, kulturo.

Marzanna NIEZABITOWSKA, 37-200 PRZEWORSK, ul. Rynek 20 m 17. 27-jara, interesigas pri turismo, sporto, vojaĝoj.

Stanislaw CZUPRYNSKI, 43-250 PAWLOWICE, ul. Gornicza 9c/5. 27-jara teknikisto, instruas Esperanton, interesigas pri turismo kaj geografio.

Eliza PETRYK, Labunki II 218 "b", 22-437 LABUNIE. 28-jara, interesigas pri turismo, vojaĝoj, kolektas bk, pm.

Halina BRZOSTOWICZ, Bierzgli 16/4, 62-302 WEGIERKI, Woj: Poznan. 28-jara, interesigas pri turismo, kulturo.

Alina CHRUSCINSKA, Aleja Lenina 40/37, 22-400 ZAMOSC. 29-jara fraŭlino, universalaj interesigoj, interesigas pri fremdaj lingvoj (bona kono de angla lingvo), ŝatas ekzoni homojn, eksterlandan kulturon, vojaĝi.

Stefan KOWALEWSKI, 62-400 SLUPCA, ul. Orzeszkowej 3/22. 30-jara, interesigas pri turismo, kulturo, sporto.

Teresa SUPERNAK, ul. Dabrowska 15, 42-454 NIEGOWONICE. 30-jara instruistino pri rusa lingvo, interesigas pri lingvoj, grandaj landoj, floroj kaj modo, kolektas pm, prospektojn, glumarkojn kaj belajn ludilojn.

Bozena MALECKA, 99-420 LYSZKOWICE, ul. B. Glowackiego 19/22, woj: Skiernewice. 30-jara fraŭlino, interesigas pri turismo, kino, kulturo, ŝatas vojaĝojn, legi librojn.

Teresa DUDEK, ul. Mieszka I 3/D/12, 44-224 KNUROW. 30-jara instruistino en antaŭlernejo, interesigas pri turismo, kulturo kaj muziko, kolektas bk, havas du gefilojn kiuj ankaŭ lernas Esperanton.

PASTUSZKA Mieczyslaw, Mrokocim 33, 57-223 LUBNOW. 31-jara fraŭlo, interesigas pri turismo, kulturo, sporto, pri ĉiuj temoj.

Edward PASEK, 44-200 RYBNIK, ul. Dabrowki 17/B/8. 32-jara, interesigas pri turismo, sportismo.

Leslawa WOJCIK, ul. Warszawska 238, 43-155 TYCHY-BIERUN N. 36-jara instruistino de matematiko, interesigas pri problemoj de la ĉiutaga vivo, historio, literaturo, fantastika literaturo, kolektas bk,

librojn, interŝanĝos albumojn pri arto kaj geografio, geografiajn prospektojn, matematikernolibrojn, kun geinstruistoj.

Bogda SZYTKONSKA, Rzeplino 54, 73-116 KOLIN, woj. Szczecin. 36-jara, interesigas pri turismo, kulturo.

Jan KANIA, Zwierzyniecka 5014, 39-400 TARNOBRZEG. 36-jara, interesigas pri turismo, kulturo, kaj ĉiuj temoj.

Anna BENDER, 22-416 SITANIEC 334. 36-jara agronomia inĝenierino, interesigas pri turismo, kulturo.

Zbigniew KAMINSKI, 32-110 TCZEW, Telmajera 3/6, woj. Gdansk. 36-jara viro, interesigas pri turismo, literaturo, ŝatas vojaĝojn, kolektas bk.

Krystyna RZEPA, 67-115 BYTOM ODRZANSKI, ul. Lipowa 3. 37-jara oficistino, interesigas pri turismo, naturo.

Anna PIKULSKA, ul. Wakonwa 5 A, 44-362 ROGOW n/OLZA. 39-jara oficistino, interesigas pri turismo, naturo kaj literaturo.

Ludvika MALECKA, str. Wodna 49, 44-200 RYBNIK 1, Katowice. 39-jara instruistino, edzino kun infanoj, interesigas pri turismo, literaturo, naturo, pri ĉiuj temoj kaj ĉiutaga vivo.

Antonina ZAVISA, Lecno 85, 37-333 LECNO. 42-jara instruistino, interesigas pri kulturo, literaturo, filmo, muziko, naturo.

Wojciech MILEWSKI, 88-140 GNIEWKOWO, P.O. Box 13. 42-jara mekanikisto, interesigas kaj kolektas bk, pm, monbiletojn, monerojn, Esperantajn insignojn el tm. Respondos al ĉiuj leteroj.

Witold MAJ, 28-400 PINCZOW, Os. Grodzisko 24-7. 42-jara instruisto, interesigas pri filatelio, sporto, moroj kaj kutimoj, kolektas pm, bk, librojn, ilustritajn sportrevuojn.

Henryk JAKUBOWSKI, ul. Kolberga 17m36, 26-600 RADOM. 48-jara elektroinĝeniero, pri ĉiuj temoj.

Eugenia WOLKOWYCKA, str. Lenina 40/31, 17-200 HAJNOWKO. 51-jara pensulinino, interesigas pri turismo, kulturo, ĉiutaga vivo en Usono.

Zbigniew MALYSZKO, Zajezcza 17, 15-531 BIALYSTOK. Serĉas korespondamikon, kiu skribos pri Usono kaj ĝiaj historio, loĝantoj, aktualaj aferoj, ktp; kaj reciproke li skribos same pri siaj lando kaj urbo.

SOVETIO

Nikolao LARIN, str. Stroltelnij 4-29, SOĈI 354068. 34-jara oficisto, ŝatas muzikon, legi librojn kaj revuojn, vojaĝojn, naturon, sporton.

F-Ivo Julia RJUPINA, ul. Lenina N15 ul. 2, SU-272630 g. IZMAIL Odesskoj obl. Kun usonanoj 23-35-jaraj, interesoj estas religio, sociaj temoj, moroj, kutimoj de diversaj popoloj, kolektas kolorajn kartojn, revuojn, ikonetojn.

Local Contacts

[* = Issues a regular or occasional bulletin or newsletter]

Arizona: Wm. Shanks, E-o Soc. of AZ, 1345 W. Escarp, Mesa, AZ 85201

California: E-o Assn. of Los Angeles, 1112-7th St. #811, Santa Monica, CA 90403

*California: E-o Klubo de San Diego, Box 288012, San Diego, CA 92128-0991, (619) 528-0880

California: Inland Empire E-o Group, 22797 Barton Rd. #117, Grand Terrace, CA 92324, (714) 689-5576 or (619) 949-1958

California: Orange Co. E-o Assn., Box 1538, Garden Grove, CA 92642

*California: E-o Soc. of Ventura County, 5968 Joshua Trail, Camarillo, CA 93010

California: Santa Barbara E-o Soc., 4710 Dexter Dr. #9, Santa Barbara, CA 93110

*California: SFERO, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA 94010, (415) 342-1796

*California: Berkeley E-o League, Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, (415) 222-0187

*California: E-o Group, 440 Bret Harte Rd., Sacramento, CA 95864

Colorado: E-o Assn., 4825 W. Moorhead Cir., Boulder, CO 80303

Colorado: Denver E-o Group, 995 Humbolt #205, Denver, CO 80218

*District of Columbia: Washington E-o Soc., 4406 - 35th St. NW, Washington, DC 20008, (202) 363-6197

Florida: Florida E-o Soc., 3988 Sabal Drive, Oviedo, FL 32765

Idaho: David Baron, Box 37, Eagle, ID 83616

*Illinois: Chicago E-o Soc., Box 64774, Chicago, IL 60664-0774

Maryland: T. Goodman, 3218 Shelburne Rd., Baltimore, MD 21208

*Michigan: E-o Soc. of Michigan, PO Box 3011, Southfield, MI 48037, (313) 646-2965

Michigan: Soc. of E-o Language Friends, P.O. Box 1178, c/o H. F. Saunders, Flint, MI 48501, (313) 233-4446

Michigan: Cereal City Esperanto Friends, P.O. Box 41, Battle Creek, MI 49016-0041

Missouri: St. Louis E-o Group, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136

Montana: Montana E-o Soc., 330 Lindley Pl., Bozeman, MT 59715

*Nebraska: Nebraska Internacia-lingva Asocio, R.F.D. 1 Box 29, Wilber, NE 68465, (402) 821-2027

*New York: NYC E-o Soc., c/o Thomas M. Eccardt, 455 E. 14th St., #3C, New York, NY 10009

New York: UN Office of UBA, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017

North Carolina: E-o Society of the Triangle, 5400 Belsay Drive, Raleigh, NC 27612

*Ohio: E-o Assn. of Ohio, 1144 Kingsdale Terr., Columbus, OH 43220

*Oregon: Portland E-o Soc., 11905 SW Setler Way, Beaverton, OR 97005

Pennsylvania: 26 E. Roumfort Rd., Philadelphia, PA 19119, (215) 248-0493

Texas: E-o Study Group, P.O. Box 1446, Houston, TX 77251-1446, tel. (713) 522-7499, (713) 666-7509

Texas: Armin F. Doncia Sr., Box 105, Pharr, TX 78577, (512) 787-2390

Texas: Rio Grande Valley E-istaro, Prenda Cook, Box 7167, Harlingen, TX 78550, (512) 423-3056

Utah: E-o Club, Box 2166, Salt Lake City, UT 84110

Washington: Seattle E-o Soc., 6002 NE 61st St., Seattle, WA 98115


Wisconsin: E-o Society of Wisconsin, 1958 N. 38th St., Milwaukee, WI 53208

*Regional (Rocky Mountain States): Intermountain E-o Group (AZ, CO, ID, MT, NM, UT, WY), p/a Charles Tustin, P.O. Box 112, Coram, MT 59913

Regional (Tidewater): E-o Society of the Carolinas and Virginia, P.O. Box 283, Durham, NC 27702-0283

*Regional (New England): E-o Soc. of New England, P.O. Box 655, Concord, MA 01742, (508) 264-4349

Special Interest: E-o Language Toastmasters Club, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116




Esperanto League for North America, Inc.
 P.O. Box 1129
 El Cerrito, CA, 94530
 Usono/USA

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
 Berkeley, CA
 Permit No. 330

NEWS—PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed

ESPERANTO



TRAVEL '90

ELNA CONVENTION WILL BE HELD IN MEXICO CITY


July 7-14, 1990
 (Samtempo kaj samloke, OFICIALA ANTAŬ-KONGRESO DE UEA)

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, HAVANA, CUBA
 July 14-21

—or for those not going to Cuba—
"MEXICO, THE COLONIAL ROUTE"
 San Miguel de Allende—Guanajuato—
 Guadalajara—Morelia—Patzcuaro

OFICIALA POST-KONGRESO DE UEA
 Taxco, Puebla, Oaxaca
 July 21-28

TRI SEMAJNOJ VOJAĜANTE EN ESPERANTO TUJO!!!



ESPERANTO TRAVEL SERVICE
 578 GRAND AVENUE
 OAKLAND, CA 94610
 (415) 836-1710

The official ELNA convention, the (as yet) unofficial Tut-Amerika Kongreso, and an "oficiala antaŭ-kongreso de UEA", will all be occurring at the same time in Mexico City. Once before we held our ELNA convention outside the U.S., in Vancouver in 1980. But this convention will certainly prove to be our most international national convention!

Although in the past the Mexican Esperantists have been hesitant to invite a convention, they are now very excited about helping to host this very interesting gathering. Classes are being started, and more Esperanto meetings are being held than have been in a long time. We hope we will continue to be a good influence on our Esperanto neighbors to the south.

Mexico City, with over 17 million inhabitants, is a mixture of ultramodern; colonial dating from the time of Cortez; Aztec palaces and temples from the 14-15th centuries; and ancient ruins. Recently during the digging of the Metro, the ruins of an ancient civilization from 1500 B.C. were uncovered. No other city in the world so easily displays its fascinating past at the same time as its beautiful contemporary culture. Music and dance abound, and we won't even talk about reasonable prices for good hotels and shopping!

The week of July 7-14 will be filled not only with business sessions for ELNA, but also with marvelous excursions in and around the city: fascinating architecture and murals abound; the archeological museum is probably the best of its kind in the world; the floating gardens of Xochimilco will become Esperantujo one morning with special music and decorations; the world-famous Folklorico Ballet will be included; a visit to the famous shrine of Guadalupe, the University and the Pyramids of the Moon and the Sun; our banquet with Mariachi music. Other full-day trips are also available.

For those who are not going to Cuba, it would be a shame not to use this trip to see more of Mexico. The Colonial route north and west of Mexico City has some of the most charming and beautiful cities in the world! The week of July 14-21 will be one to relish for years, and yes, of course, we will have full Esperanto translation!

After the UK in Cuba, Esperanto Travel Service's "Oficiala Post-Kongreso" will visit Taxco, Puebla, and Oaxaca—cities which bring to mind the mental picture of how you think romantic Mexico has got to look.

Detailed information on these tours will be available from Esperanto Travel Service. If you do not regularly receive Esperanto tour information from them, write or call to have your name added to their list.

ELNA

President: Ken Thomson (1990)
 Vice President: Dr. Duncan Charters (1990)
 Secretary: Virginia Stewart (1992)
 Treasurer: John B. Massey (1991)
 Other Board Members: Prof. James Fonseca (1990), William R. Harmon (1990), David Wolff (1990), Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992)
 Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland-Kaupp (Correspondence Courses), J. Gildemeister (Legislative Affairs), R. Kent Jones (Science & Technology), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Stein (Women's Affairs), Dr. James Cool (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs)
 Director, ELNA CO: Mark Stephens
 ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1990	
Friend of Esperanto	\$7.50
Regular	\$25.00
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15.00
Sustaining	\$50.00
Life	\$500.00

Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

UEA dues 1990

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA/UEA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1989(7) of the ELNA Newsletter is December 25, 1989!
DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1990(1) of the ELNA Newsletter/Esperanto U.S.A. is February 25, 1990!

ELNA/UEA membership renewal kits and periodical subscription forms will be mailed to all current members via bulk rate mail at the beginning of November.

ELNA Newsletter
 Volume 25, No. 6
 ISSN 0030-5065
 Esperanto League for North America, Inc.
 P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
 Telephone: (415) 653-0998
 Editor: Don Harlow
 Typesetting & Graphic Design:
 Gregory V. Wasson